




Boletín

n° 408 Oktobro - Decembro 2014



Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 408

Redakto-skipto
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: Alejandro Pareja

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio
Vicprezidanto: Ángel Arquillos López
Sekretario: Félix M. Jiménez
Kasisto: Raúl Mtnez. Anguita
Voĉdonantoj: Eduardo Berdor
Juan José Vera
Jesús García Cano

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012

Salutvortoj

Karaj gelegantoj de Boletín:

Kun granda plezuro mi salutas vin ĉiuj profitante la jarfinon por deziri al ĉiuj Felician kaj Fruktodonan Novan Jaron 2015.

La enhavo de ĉi bulteno plenplenas je interesaj novaĵoj pri esperantaj aferoj: renkontiĝoj, kongresoj, raportoj publikigitaj en diversaj hispanaj ĵurnaloj, kaj interealie elstaras la interlingvistika kursaro ĉe pola Universitato Adam Mckiewicz (UAM) en Poznano, kun partopreno de tri hispanoj el Andaluzio, Galegio kaj Madrido, pri kiuj ni jam parolis ĉe la antaŭa numero de Boletín.

Sur la tria paĝo vi ĝuos la noticon pri tri elstaraj hispanaj membroj de la t.n. Ibera Skolo, verkistoj kaj poetoj kiuj aperas en la sveda libro eldonita de Kava-Pech kaj titolita Söka bostad i storstaden.

Mi certas ke inter la legantoj de ĉi bulteno estas homoj, kiuj ne kuraĝas partopreni per artikoloj, raportetoj pri novaĵoj, pro timo aŭ honto. Mi rekomendas al vi partopreni, ĉar la bulteno estas afero de ĉiuj membroj de HEF kaj ĉio rilate al la internacia lingvo estas afero interesa por legantoj. Skribu pri via sperto kun Esperanto, viaj konatuloj, kolegoj kaj pluraj ĉiutagaj aferoj, anekdotoj, mencio de E-o en ĵurnaloj aŭ romanoj, ktp.

La Redakcio pretas kunlabori kun la novaj kunlaborantoj per revizio kaj korektado de viaj tekstoj.

Ĝuu la legadon.

Ángel Arquillos
Redaktoro de Boletín

Enhavo

Salutvortoj	1
Grava novaĵo	2
Gratulon	3
Fundación Esperanto Informado 2014 kaj projektoj 2015	4
60 jaroj da Unkesco kaj Esperanto	5
Pri grupoj kaj Asocioj	6
74-a Hispana Kongreso de Esperanto	12
Omaĝo al profesoro Juan Régulo	15
Liven Dek en Kroatio kaj Slovenio	16
Esperanto en televida programo pri edukado	17
Literatura vizito en Madrido/ Du prelegoj pri la ĉielo kaj Esperanto	18
Esperanto kaj Universitato en Andaluza Kongreso/Artikolo pri Fco Azorían	19
Kuriozaĝoj pri Svislando	20
Esperanto-videoj el Hispanio	21
Intervjuo al la nova prezidanto de HEJS	22
Poezia Angulo	23
La lirika voĉo de María Ángeles Maeso esperantigita	24
Aliaj Lirikaj perloj de Antonio Marco Botella	26
Dua konkurso pri rakontoj de Los Pinos del Retiro	27
Esperanto-videoj el Hispanio	30
Nekrologe	31
Lasta hora-novaĵo pri Esperanta muziko	32

GRAVA NOVAĴO

ESPERANTO OFICIALE FARIĜIS NEMATERIA KULTURA HEREDAĴO DE POLLANDO

La 20-an de novembro prof. Małgorzata Omilanowska, la pola ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo, aprobis lokiĝon de la lingvo Esperanto sur la "Polan liston de nemateria kultura heredaĵo".

Tio estas rezulto de klopodoj iniciatitaj de Edmund Wittbrodt, membro de la pola senato, kaj s-ro Kazimierz Krzyżak, estrarano de la Pola Asocio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE-PL).

La nuna sukceso estas bazo, antaŭkondiĉo por proponi al UNESKO enlistigi Esperanton sur la "Reprezantan liston de nemateria kultura heredaĵo de la homaro".

Gratulon al la pola sekcio de EDE!



GRATULON!

Söka bostad i storstaden

och andra noveller översatta
från originalen på esperanto

av Sten Johansson
och Leif Nordenstorm



ESPERANTOFÖRLAGET

Baghy, Marjorie Boulton, Stellan Engholm, Raymond Schwartz, Ivan Sjrjajev, Spomenka Štimec, Trevor Steele...

La redakcio de *Boletín* esprimas al ties regulaj kunlaborantoj Liven Dek, Jorge Camacho kaj Miguel Fernández, kaj al la tuta Ibera Skolo, sian plej varman gratulon kaj instigas ilin plue verki kaj la tutan esperantistaron legi iliajn verkojn.

La novaĵo trafis nin antaŭ nelonge kaj plenigis nin per ĝojo kaj fiero: verkoj de tri konataj hispanaj esperantistoj regule kunlaborantaj ĉe *Boletín* estis tradukitaj en la svedan lingvon. Temas pri la mikronoveloj *Paseroj* kaj *Tezeo*, el la kolekto *Ne ekzistas verdaj steloj*, de Liven Dek, kaj la noveloj *Neniam plu* (*Aboco de amo*), de Jorge Camacho, kaj *Du gardenioj*, de Miguel Fernández.

Ĉi du lastaj verkoj estis ĉerpitaj el la kvaropa rakontaro *Ekstremoj*, unu el la emblemaj kolektivaj produktoj de la t.n. Ibera Skolo, al kiu, kiel vi scias, apartenas Dek, Camacho kaj Fernández.

Ĉiuj ĉi tradukoj aperas en libro eldonita de Kava-Pech kaj nomata *Söka bostad i storstaden*, kie leĝblas svede la 30 E-rakontoj plej antologiindaj el la historio de la esperanta rakont-arto, laŭ la kriterio de la kompilintoj kaj tradukintoj Sten Johansson kaj Leif Nordenstorm. Vere karesas la koron konstatii, ke verkoj de niaj tri amikoj havas lokon en tiu antologio, kaj vidi iliajn nomojn inter tiuj de la granduloj de nia rakontistiko: Julio

La Redakcio

FUNDACIÓN ESPERANTO

INFORMADO PRI 2014

La komenca buĝeto (300 €) estis (feliĉe) pligrandigita danke al mono kiu "alvenis" surprize.

Pri konkretaj ekonomiaj helpoj dum 2014, jen la decidoj faritaj:

Al Suso Moinhos, 500 €, por partopreno en E-kurso en Poznan (Pollando).

Al Enric Baltasar (de Valencia Esperanto-Asocio): 300 €, por projekto de disvastigo kaj instruado de Esperanto.

Al Grupo Esperantista de Bilbao: 400 € pro elspezoj pri instalado de lifto en la domo de la sidejo.

Al Frateco (de Aragono): 200 € pro eldono de la libro *Hispana Lirika Antologio*.

(La unua kaj la dua estis pagitaj en aŭgusto)

Krome, kiel kutime, en nia sidejo estis organizitaj E-kursoj por komencantoj senpage.

PROJEKTOJ POR 2015

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2015.

Lastatempe, la elspezoj kreskis kaj la enspezoj malpliĝis. Tial, la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 300 €.

Lorenzo Noguero (Sekretario de *Fundación Esperanto*)



FUNDACIÓN
ESPERANTO

60 JAROJ DA UNESKO KAJ ESPERANTO

La 10-an de decembro la Esperanto-movado festis la 60-an datrevenon de ĝia unua oficiala agnosko kadre de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj. Konkrete, la 10-an de decembro 1954 la Ĝenerala Konferenco de Unesko per oficiala rezolucio notis la kontribuojn de Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo, kaj agnoskis, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko.

Okaze de la 60-jariĝo de la unua Unesko-rezolucio, la prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes, verkis koncizan deklaron, kiu resumas la signifon de la kunlaboro inter la Esperanto-movado kaj Unesko. Ĝi estas legebla komplete (apude) kaj HEF tradukis ĝin en la hispanan lingvon en nia retejo.

Dum la venontaj monatoj UEA lanĉos kampanjon “Montevideo 60” por festi la datrevenon kaj reliefigi la multajn ligojn inter la agadoj de la Esperanto-movado kaj la laboro de Unesko. Hispana Esperanto-Federacio aliĝos al la kampanjo kaj provos ĝin efektiviĝi en Hispanio.

Deklaro de Mark Fettes: "Esperanto kaj Unesko: 60 jaroj de komunaj streboj"

Hodiaŭ, en la Internacia Tago de Homaj Rajtoj, la movado por la internacia lingvo Esperanto samtempe festas la 60-jariĝon de sia kunlaboro kun Unesko, la branĉo de Unuiĝintaj Nacioj taskita pri edukado, scienco kaj kulturo.

Esperanto mem estas lanĉita antaŭ pli ol 127 jaroj, en 1887, kun la celo faciligi toleremon, kunlaboron kaj interkompreniĝon inter homoj el ĉiuj landoj. Per la disvastigo de lingvo, kiu estas komuna kaj libere uzebla posedaĵo de ĉiuj popoloj, la esperantistoj ekde tiu tempo laboras por la konstruado de unuiĝinta, paca, justa kaj prospera mondo.

Siavice, Unesko naskiĝis el la detruaj jaroj de la dua mondmilito, kiam fariĝis evidente, ke vera paco devas konstruiĝi en la mensoj kaj la koroj de la homoj. Tiu eduka misio ampleksas ne nur bazan klerigadon, sed ankaŭ la profundigon de reciprokaj kulturaj konoj inter la diversaj landoj kaj popoloj, inkluzive de la roloj de scienco kaj teknologio en la konstruado de paca mondo.

Hodiaŭ tiuj streboj estas same aktualaj kaj urĝaj, kiel antaŭ 60 jaroj. La mondo intertempe fariĝis multe pli proksime interligita, sed la principoj de egaleco kaj justeco ne estas tiuj, kiuj regas la procezon de tutmondiĝo. Kreskas la minacoj al kultura kaj lingva diverseco, kiun Unesko same kiel la esperantistoj rigardas kiel trezoron de la homaro; kreskas malegaleco, inkluzive de lingva malegaleco, en multaj sferoj de la homa vivo; kaj daŭras persekutoj, konfliktoj kaj militoj surbaze de diferencoj kulturaj, religiaj kaj politikaj.

Kiel la ĉefa tutmonda organizo de la parolantoj de Esperanto, Universala Esperanto-Asocio rekonfirmas la profundan paralelon inter siaj agadoj kaj la laboro de Unesko. Esperanto estas ne nur teknika rimedo de komunikado, sed kultura kaj eduka projekto, celanta daŭripovan kaj justan mondan socion. En tiu spirito ni alvokas por vasta subteno al la streboj de Unesko sur plej diversaj kampoj de edukado, scienco kaj kulturo, kaj deklaras nian intencon plu energie labori por ilia diskonigo kaj realigo.

Mark Fettes

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio



Post kelkaj jaroj da silento, esperanton oni denove aŭskultas en Seviljo. Ĉi-jare Andaluzia Esperanto-Unuiĝo decidis organizi la Zamenhofan Feston en la andaluzia ĉefurbo, tiel la pasintan 13an de decembro renkontiĝis la sevila esperantistaro okaze de manĝado.

Partoprenis 25 geesperantistoj, kelkaj antikvaj movadanoj, la plejmulto novaj gelernantoj de la kursoj okazantaj en Seviljo, tiuj organizataj de Rafael Mateos ĉe la Publika Biblioteko kaj de Sevila Esperanto-Asocio en urbodoma centro. Ankaŭ alvenis kelkaj esperantistoj de Malago kaj Seviljo.

Kompreneble la etoso estis amuza kaj naskiĝis novaj ideoj por reorganizi la movadon en Seviljo. Oni informis pri la intereso de kelkaj universitataj profesoroj rilate la lingvon kaj ankaŭ pri la baldaŭna alveno de franca esperantisto kiu laboros en la Sevila Universitato dum 3 monatoj, espe- reble ni povos kalkuli kun li cele la daŭrigon de la kursoj de Esperanto en la urbo.

Do, ni esperas, ke ĉiuj novaj interesitoj en la internacia lingvo kunlaboros en la reorganizado de la movado en Seviljo, urbo kiu ĉiam estis brila centro por Esperanto en Andaluzio kaj en Hispanio.

José María Rodríguez

Alikanto

ESPERANTO KAJ FILATELIO

Dum la pasintaj monatoj estis organizita la 16-a Filatelie Ekspozicio de la provinco Alikanto (Alicante/Alacant). Unu el la prezentitaj temoj estis kolekto de poŝtmarkoj pri Esperanto, prezentita de nia amiko kaj longjara membro de HEF, Rodolfo Canet, kiu ricevis diplomon kaj gratulon de la provinca deputito pri Kulturo (vidu kunan foton).

La unua fazo okazis inter la 15a kaj 28a de septembro en urbo Benissa. De la 30a de septembro ĝis la 15a de novembro la ekspozicio translokiĝis al la Palaco de la Deputitaro en la provinca ĉefurbo Alikanto.

Eblas rigardi pliajn informojn kaj kelkajn fotojn en la adreso: www.filalacant.org/ExpoXVI/.



Ekstremaduro

TALLER DE **ESPERANTO** IDIOMA FÁCIL Y FASCINANTE

¡Haz amigos en todo el mundo!



INICIO: Martes 25 de noviembre.

HORA: 20.00 horas.

INFORMACIÓN E INSCRIPCIONES:
UNIVERSIDAD POPULAR HERRERA DEL DUQUE
924 64 22 14 ó upherreradelduque.es



ESPERANTO EN HERRERA DEL DUQUE

Fine de la jaro komenciĝis en la urbeto Herrera del Duque (provinco Badajoz) enkonduka kurso de Esperanto. Post sukcesa presenta prelego plus ateliero, la kurso komenciĝis kun dudeko da lernantoj, sub la gvido de nia samideano Javier Romero Tello.

La loka ĵurnalo "Hoy Herrera del Duque", aperigis raporton, kun intervjuo al Javier, eksplikante la naturon de Esperanto kaj montrante sian esperon povi okazigi la Hispanan Kongreson de Esperanto en Herrera del Duque en la jaro 2016.

Javier Romero Tello

Eŭskio

La sabaton 13-an de decembro geesperantistoj de la urbo Bilbao kaj ĉirkaŭaĵoj kuniĝis en la sidejo de la loka E-Grupo por festi la naskiĝtagon de Dro. Zamenhof. Entute, ĉirkaŭ 20 homoj partoprenis la eventon.

Je la komenco, nia kortuŝa samideano Eduardo Larrouy, preskaŭ 102-jara, kuraĝigis la aŭskultantojn, pere de vigla parolado, al senlaca laboro por la disvastigo de Esperanto.



Poste, ĉirkaŭ tablo plenplena de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj, estis la okazo por renkontiĝi kun konatuloj kaj praktiki Esperanton. Ne nur esperantistoj, sed ankaŭ amikoj ekstermovadanaĵ partoprenis la kunvenon kaj kontribuis al varma kaj alloga etoso: nur la malfrua horo sukcesis, kun bedaŭro, forigi nin el la ejo... ĝis la venonta jaro.

Jesús Miguel García Iturrioz

Kantabrio



menuo fazeola ĉiam artendas la piedirantojn, ie ajn.

Ángel García G.

KantEa festis la Zamenhoftagon la 13an de decembro per komuna tagmanĝo, kiun ĉeestis 24 homoj. En bonega, frateca etoso, oni samtempe festis la centjariĝon de la libro “Platero kaj mi”, eldonita de AEU kaj tradukita kaj ilustrita de du kantabroj: Miguel Gutiérrez kaj Pedro Ullate, respektive. Ankaŭ estis prezentita la libro “Söka bostad i stors-taden” (*Buscar alojamiento en la gran ciudad*), svedlingva antologio de esperantaj rakontoj el 29 aŭtoroj ĉiutempaj, por kiu oni elektis la kantabron Liven Dek.



Nuntempe ekde lundo ĝis ĵaŭdo, je la 8-a vespere, okazas 3-nivela Eo-instruado gvidata de nia kompetenta profesoro Miguel Gutiérrez (Liven Dek).

Miguel multe da tempo, sindediĉo kaj energio ofertas por la lernigado de Eo.

Per la 1-a nivelo oni instruas la novajn kursanojn kaj al la senlacaj entuziasmaj kurso-ripetemuloj. La 2-a grado celas la lingvo-progresantojn kaj la perferktigado okazas en la nivelo 3-a.

Aparte, niaj klubanoj interkonsentis aĉeti novan komputilon kun sufiĉe granda ekrano kaj potenza procesoro; tio helpos nin pri la instruigaj laboroj kaj oficaj taskoj.

Krom esperantaj aferoj, niaj klubanoj ofte ekkuras en la bela naturo de tiu-ĉi regiono kaj en apudaj vizitindaj lokoj de najbaraj provincoj. Tagmeze, hispana

MGA

Madrido

ZAMENHOF-TAGO EN MADRIDO

La dimanĉon 14an de decembro, antaŭtage de la Internacia Tago de Esperanto, la madridaj esperantistoj kaj simpatiantoj kunvenis por pasigi belan tagon honore al la kreinto de nia lingvo. Por tio, kiel pasintjare ili denove renkontiĝis en la sidejo de la *Asociación de Vecinos de Zofio*, distrikto Usera de Madrido.

La matenon oni dediĉis al prelegoj.



Unue, Toño, prezidanto de HEF, bonvenigis la ĉeestantojn kaj instigis legi la verkojn de Zamenhof, plu aktualaj hodiaŭ, por lernantoj kaj por spertuloj. Li specife memorigis la "Alvokon al Diplomatoj", kiun Zamenhof verkis ĝuste antaŭ cent jaroj, kiam pli furiozis la Unua Mondmilito, kiun ĵus reprenis la gazeto "La Ondo de Esperanto", kaj kies ĉefaj tezoj montriĝis des pli klarvidaj.

Poste, Miguel Fernández prezentis kelkajn novajn librojn kaj projektojn. Unue, la konatan antologion de revoluciema literaturo, Poezio, armilo ŝargita per futuro, kiun SAT-en-Hispanio reeldonis pro elĉerpiĝo de la antaŭa eldono. Sekve, li prezentis la antologion de rakontoj originale verkitaj en Esperanto kaj tradukitaj en la svedan, kun la titolo "Söka bostad i storstaden". Poste, li rakontis pri la tri projektoj pri kiu li nun intense laboras. Unue, pri la traduko, preskaŭ preta, de *Bohemiaj Lumoj*, de Ramón Maria del Valle-Inclán. Due, pri tradukoj de libro pri anarkiismo, inklude de ties rilato kun Esperanto. Trie, pri la esperanta versio de la memoraĵoj de nia esperanta pioniro Jaime Grau Casas, pri liaj travivaĵoj en la koncentrejoj de Francio post la hispana interna milito. Tiu libro estis ĵus eldonita en franca versio, kun titolo *Ulysse sur la boue*, kaj oni nun laboras pri versioj en la hispana, kataluna kaj Esperanto.

Tuj poste, la prezidanto de la kvartala asocio ĉe kiu ni gastis, rakontis al ni, hispane, pri la agadoj de la asocioj, kaj pri la malbonaj cirkonstancoj kiujn ili trapasas, sekve al ĉikanoj ricevitaj fare de la urbestraraj aŭtoritatoj.

Fine, Félix Jiménez Lobo prelegis pri la Interlingvistikaj Studoj en Poznano, kiun li partoprenas, kaj instigis partoprenontojn por postaj kursoj. Temas pri tre grava sperto persona, tre altnivelaj studoj, kaj tre grava evento por la esperanta komunumo, kiun oni sukcesas pluvivigi ankaŭ per la helpo de bonvolemluloj kaj asocioj.



Poste oni organizis komunan manĝadon, per la pladoj alportita de la partoprenantoj mem. Ĉijare speciala evento estis la gustumado de novaj neindustriaj bieroj produktitaj de la kooperativo Speranto, nomataj "Zamenhof" kaj "Blanka Tigro", kun ĝenerala kontentigo.

Dum la postmanĝado oni organizis tabloludojn, kaj atelieron pri fabrikado de

sapo. Estis muntita abunda Libroservo.

Fine, estis aranĝita projekciado de *La plejpleja festivalo*, dokumenta filmo pri la Kultura Esperanto Festivalo en Helsinko en 2005.

Entute la feston partoprenis ĉirkaŭ trideko da homoj, en diversaj periodoj de la tago.

HEF

Salamanko

La 15an de decembro vespere kelkaj esperantistoj el Salamanca kaj Zamora renkontiĝis por kune festi la Zamenhof-tagon en varma kaj amikeca etoso. Ni interŝanĝis niajn konojn pri la internacia



lingvo kaj komentis kelkajn esperantajn librojn kaj metodojn pri Esperanto. Iamaniere la kunveno taŭgis ankaŭ por lerni kaj paroli pri kelkaj iom komplikaj aspektoj de la lingvo.

Ni sufiĉe amuziĝis kaj jam atendas venontan kunvenon kiu supozeble okazos en Zamora.

Fernando Miguel Lorenzo

Taragono

VIZITO DE HEF-PREZIDANTO AL TARRAGONA



Mardon, la 28an de oktobro Toño del Barrio, nuna prezidanto de HEF (Hispana Esperanto Federacio), vizitis Tarragonan pro profesia kialo. Li profitis la okazon por renkonti la grupon de aktivaj geesperantistoj en nia urbo.

Ili vizitis kune la kulturen centron «COOPERATIVA OBRERA TARRACONENSE / TARRAGONA LABORISTA KOOPERATIVO» (COT), kie la esperantistoj kunvenas regule.

Poste la tuta grupo de esperantistoj promenis tra la ĉefa urba promenejo «La Rambla Nova», Balkono de la Mediteraneo, la placo de la urbodomo ĝis la katedralo.

Hazarde, la grupo trafis trejnadon de homturoj en la sidejo de «Xiquets de Tarragona», unu el la homturaĵoj de la urbo.

Finfine la grupo kune vespermanĝis kaj amike babiladis en bela restoracio, kiu troviĝas en mezepoka konstruaĵo, en la malnova kvartalo.

Josep Maria Serrano

Teruelo

ARTIKOLO PRI FRANCISCO AZORÍN

Ege interesa artikolo pri Francisco Azorín Izquierdo estis publikigita de la ĵurnalo Diario de Teruel la pasintan 30-an de novembro. Arĥitekto, politikisto, esperantisto, la raporto malkovras ankaŭ lian laboron kiel verkisto.

Naskiĝinta en la provinco de Teruelo, li pasigis sian profesion vivon en Kordovo, kaj devis ekziliĝi al Meksiko post la hispana interna milito. Francisco Azorín estis tre aktiva en la socialista esperantista movado antaŭ la milito, kaj poste daŭrigis sian kulturen kaj esperantistan aktivadon en Meksiko, kie li forpasis en 1975.



74-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO CULLERA 2015

Kiel ni informis en pasinta Boletín, la 74-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu ankaŭ estos samtempe Renkontiĝo de Valenciaj Esperantistoj, okazos en la konata turisma urbo Cullera, proksime al Valencio, inter la 1-a kaj 3-a de majo 2015. La kongresejo estos la Kultur-domo, afable havigita de la urbestro. Ni atendas vin ĉiujn tie!

Programo

Ni disponigas al vi tre provizoran programon, por ke vi povu vidi pri kio ni laboras. Se vi volas proponi vin por aranĝi iun programeron, esti la respondeculo de unu, doni ideojn aŭ io alia, kontaktu nin. Krome, ni informas al vi ke ni serĉas ĉefe ludajn kaj artajn programerojn, kiel muziko, team-ludoj kaj poezio.

VENDREDO 1-a Tago	<ul style="list-style-type: none"> – Neoficiala malfermo – Interkonatiga vespero – Enkonduka kurso al Esperanto – Oficiala inaŭruo kaj donaco al la municipa biblioteko. – Prelego pri temaj portaloj en Esperanto kaj retmerkato; praktika kazo VeganArto
SABATO 2-a Tago	<ul style="list-style-type: none"> – Valencia pillkludo surstrate – Ekskurso tra Cullera – Ĉu vi kuraĝas esti pli kreiva? Ateliero de kreivaj teknikoj – Peĉakuĉoj – Tablo-rondo: Esperanto kaj minoritataj lingvoj – Frateca manĝo – Tablo-rondo: politiko antaŭ la balotadoj – TEJO: kion vi povas fari por la Esperanto-movado – Ateliero: la merkatikisto de Esperanto – Ateliero de vegana kuir-arto. – Partoprenu grupan eksperimenton pri merkato – Muziko en Esperanto – Nokta vivo en Cullera
DIMANĈO 3-a Tago	<ul style="list-style-type: none"> – Gvidata turisma vizito. – Ordinara asembleo de la Hispana Esperanto-Asocio – Eksterordinara asembleo de la Valencia Esperanto-Asocio kaj valenciaj kolektivoj

Ĉar la vendredo estos feria tago, tio plej probable estas ke ni aranĝas antaŭkongreson ĵaŭde, aŭ ke la Kongreso komenciĝos la vendredon matene, ekzemple per vizito tra Valencio.

Aliĝo

Partopren-kotizoj

KOTIZOJ	Aliĝo ĝis 15/02/2015	De 16/02/2015 ĝis 31/03/2015	Post 31/03/2015 aŭ surloka aliĝo
Membro de aranĝanta asocio	35	45	55
Nemembro de aranĝanta asocio	45	55	65
Juna membro de VEA, VEG aŭ HEJS	19	29	39
Juna nemembro (malpli ol 30 jarojn)	25	35	45

La aliĝo estas senpaga en la jenaj kazoj:

Naskiĝintaj post 31/12/1989.

Nepra akompananto de handikapulo.

Gravaj kunlaborantoj de la kongreso (unue inserkonsentu).

Aliaj homoj kiuj deziras partopreni sed vere ne povas pagi (kontaktu).

Kiel pagi?

Enkontigo:

Konto: 1491 0001 26 2074618022 (de Hispanio)
IBAN: ES21 1491 0001 2620 7461 8022 (pago ekster Hispanio)
Banko: Triodos Bank
Nomo: Vicente Faulí Amaro
Urbo: Valencia
Kialo: Kongreso + via aŭtonomo kaj familia nomo.

La aliĝo efektiviĝos la pag-tagon. Se eble, sendu al ni atestilon montrante vian pagon, al kongreso@esperanto.es
Aliĝilo


Vi povas plenigi kaj sendi ĝin per retformularo: <http://goo.gl/XZ4qQR>

Alia opcio estas sendi la postulatajn datumojn per poŝto al:

Asociación Valenciana de Esperanto
Passeig Gregori Maïans, 5, 5, 14
46780-Oliva (Valencia)
España

Pri Cullera

**74-HISPANA KONGRESO
DE ESPERANTO**



**CULLERA (Valencio)
"Novaj Perspektivoj"**

de la 1-a ĝis la 3-a de majo 2015

Cullera estas urbeto en kiu loĝas pli ol 23.000 homoj, kie enfluas en la maron la rivero Xúquer, kaj kie homoj vivas de antaŭ pli ol 25.000 jarojn, kiel pruvas la supera paleolitika kuŝejo kiu estas en la Groto de la Lumtur-Vulkano (Cueva del Volcán del Faro).

Ĝi estas bone komuniki-ta, inter la ĉefurbo Valencio kaj la provinco Alakanto, tial ne strangan gas ke ĝi estas turisma urbeto.

Gastigado

Cullera estas turisma urbeto, tial estas multe da gastiga oferto.

Prenu en konsideron ke la kongresejo estos la (Casa de Cultura) en la strato Pescadors, 79.

Ni rekomendas al vi atenti pri la jenaj paĝoj:

Booking: [http://
www.booking.com/city/
es/cullera.es.html](http://www.booking.com/city/es/cullera.es.html)

Infohostal: <http://www.infohostal.com/guia/valencia/cullera/2582/alojamiento/hostales.html>C

Kampadejoj: <https://www.google.es/search?output=search&scient=psy-ab&q=camping+cullera&btnG=>

Lui apartamenton: <http://www.niumba.com/comunidad-valenciana/valencia/apartamentos/cullera>

OMAĜOJ AL PROFESORO JUAN RÉGULO EN KANARIOJ

En la fino de la jaro intensiĝas la omaĝoj al Juan Régulo Pérez, unu el la ĉefaj eldonistoj de literatura en Esperanto, kaj unua universitata profesoro pri Esperanto en Universitato de Hispanio, konkrete en tiu de La Laguna, en la kanaria insulo Tenerifo. Kialo estas ke dum 2014 ni festas la centan datrevenon de lia naskiĝo, kiel ni informis komence de la karo.



Régulo naskiĝis la 31-an de marto 1914 en alia malgranda insulo de tiu Kanaria Arkipelago, La Palma, kaj diversaj aŭtoritatoj tieaj, speciale tiuj de la naskiĝurbo Garafía, organizis agadojn por lin memori, en kelkaj el kiuj partoprenis la Esperantista Societo de Tenerifo (ESTO).

Unu el la plej gravaj estis la ekspozicio organizita de la urbestro, kiu jam estis muntita en la urbo fine de septembro kaj de antaŭ kelkaj tagoj estis denove montrata en tre karakteriza kultura centro, nomata la "Sociedad la Cosmológica" (Kosmologia Societo). Tiu ĉi lasta lasta elmontro estis inaŭgurata la 22-an de novembro, kun la partopreno de unu el la filinoj de Juan Régulo, María, kaj dum ĝi oni donis la nomon de la profesoro al la hemeroteko de la Asocio.

Tre kortuŝa estis ankaŭ agado en la adopta urbo de Don

Juan, La Laguna, la 29-an de oktobro. En la solena preleĝejo de la "Real Sociedad Económica de Amigos del País de Tenerife" (prestiĝa bonfara societo de Tenerifo), afable cedita al ESTO, kunvenis en preskaŭ familia etoso societanoj de la klubo kaj amikoj de Don Juan Régulo por kune elvoki lian figuron. Profesoro Leandro Trujillo Casañas festparolis pri la vivo kaj laboro de la fondinto de nia societo, de liaj tre humilaj originoj antaŭ cent jaroj al lia monda famiĝo kiel eldonisto. Antaŭe, prezidanto de ESTO, Antonio Suárez, prezentis la reeldonon de la libreto "De una adopción y un homenaje" ("Pri adopto kaj pri omaĝo"), en tago tridek jarojn post la omaĝo kiel Adoptita Filo de La Laguna, omaĝo kiu estigis la originalan eldonon. Oni ne povis senemocie aŭskulti la vortojn de Régulo, sopiranta al la eterna vivo de la memoro inter la homoj kiuj konis kaj amis lin. Memoro kiu estas daŭre konservata de la tenerifaj kaj hispanaj esperantistoj.

HOMENAJE

100 AÑOS DEL NACIMIENTO DEL PRIMER CATEDRÁTICO ESPAÑOL DE ESPERANTO

CASA DE LA CULTURA DE GARAFÍA (SANTO DOMINGO)

27/9 * 24/10
JUAN RÉGULO PÉREZ Y EL ESPERANTO
DESPUÉS DE BABEL
EL SUEÑO DE JUAN RÉGULO
LUNES A VIERNES 11 A 14 H
MARTES * JUEVES * VIERNES 10 A 14 H

27/9 * 19 H
EL ESPERANTO EN CANARIAS
ANTONIO SUÁREZ

LA INVESTIGACIÓN DE DON JUAN RÉGULO EN LA HERMOTECA DE LA REAL SOCIEDAD COSMOLÓGICA DE SANTA CRUZ DE LA PALMA
AL. GARMEN AGUIAR

ORGANIZA
MAYORALDÍA DE GARAFÍA
COLABORA
AYUNTAMIENTO DE GARAFÍA
MUSEO DE LA PALMA

EXPOSICIONES

CONFERENCIAS

JUAN RÉGULO PÉREZ

Live'n Dek en Kroatio kaj Slovenio

La hispana verkisto Live'n Dek (Miguel Gutiérrez Adúriz) estis la ĉefa invitito de la 12a Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj kaj Tradukistoj, organizita de Kroata E-Ligo kunlabore kun Esperanto-Societo Trixini, la financa helpo de Ministerio pri Kulturo de Kroatio kaj la aŭspicio de Akademio Literatura de Esperanto, okazinta la 13an de septembro 2014 en Hrašćina, Kroatio.

La aranĝo, kiun gvidis la verkistino Spomenka Štimec, komenciĝis per komuna kampara pikniko kaj du kursoj: unu por komencantoj kaj alia por progresintoj. Sekvis koncertoj de la kantisto Neven Mrzlečki, kaj la muzikistino Kaja Farszky. Tomasz Chmielik omaĝis al la pioniro Edmond Privat kaj prezentis diversajn verkojn, tri el alban-devena literaturo. La libroj "Padma, la eta dancistino" kaj "De Patagonio ĝis Alasko" de Tibor Sekelj estis respektive prezentiaj de Erszébet Sekelj kaj Josip Pleadin, akompanata de parto el la traduka grupo, kiu partoprenis la eldon-projekton.


Zlatoje Martinov prezentis nian samideanon Miguel Gutiérrez Adúriz, analizante lia poezian kaj prozan verkaron. Krome, oni legis kelkajn el la poemoj kaj mikronoveloj de Live'n Dek, kiu respondis al demandoj de la ĉeestantoj pri sia verkaro kaj pri la Ibera Skolo.

Fine, Judita Rey Hudeček prezentis la libron por infanoj "La heliko Slavek en sunflora kampo", kune kun la aŭtorino Sonja Zubović, kaj spicite de nova interveno de nia samideano Miguel Gutiérrez, kiu kantis originalan E-kanton ĝuste pri heliko.

Post turisma tago en la bela urbeto Varazdin, Live'n Dek devis vojaĝi, kune kun Zlatko Tišljar al la Slovena urbo Maribor, por paroli denove pri sia verkaro kaj pri la Ibera Skolo. La prezento estis alte aprezata de la ĉeestantaro, kiu faris multajn interesajn demandojn, kio plilongigis la aranĝon unu horon pli ol antaŭvidite.



La sekvan tagon, jam de nove en Zagrebo, Liven Dek estis prezentita en la Hispana Societo (Biblioteko Bogdan Ogrizović). La aranĝo estis tre sukcesa kaj ĝi okazis en la hispana lingvo kun samtempa tradukado en la kroatan. Ĉeestis profesoroj de la Universitato kaj la grava kroatingva verkisto Predrag Matvejević.



Unu tagon poste, Plia prezento de Liven Dek, ĉi-okaze en la sidejo de Kroata Esperanto-Ligo, kiel gasto de la unua aŭtuna renkontiĝo de la membroj de Esperanto-Societo Tibor Sekelj. Denove multas la priliteraturaj demandoj kaj la intereso pri la Ibera Skolo.

Aldone al ĉio ĉi, en la sekvaj tagoj, okazis etaj intervjuoj por la revuo Tempo kaj por la nacia radio de Kroatio, kaj pluraj horoj da laboro por reakiro kaj kopiado de malnovaj filmajoj, siatempe faritaj de Krunoslav Tišljar.

Resume, tre interesa "laborvojaĝo", el kiu nia samideano venis kun multaj horoj da filmajoj, kiujn oni povas spekti en la jutuba kanalo "Esperanto Viva", kaj en la nova jutuba kanalo "Historiejo".

Abdul Kamin

ESPERANTO EN TELEVIDA PROGRAMO PRI EDUKADO

Sabate la 8-an de novembro, oni elsendis en televida programo pri eduka sistemo de la regiona kanalo Canal Extremadura, intervjuon kun nia ano José María Salguero (Kani), pri lia laboro por instruado de Esperanto en la mezlernejo "Cuatro Caminos" de la ekstremadura urbo Don Benito.

La programo estas spektbla en la retejo de la programo, kaj ankaŭ en la retkanalo de HEF, en la adreso: <https://www.youtube.com/watch?v=Wpb8MA-CI3g> Kani



Gelernantoj de mezlernejo "Cuatro Caminos"

LITERATURA VIZITO EN MADRIDO



Nicola Ruggiero, juna poeto el Italio nun loĝanta en Rejkjaviko, pasigos la unuajn tagojn de oktobro en Madrido, kaj ni profitos la okazon por aranĝi prelegojn kaj kunvenon.

La vendredon 3-an de oktobro, je la 7-a vespere, Nicola prelegos en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio pri la verko "La poemo de Utnoa", de Abel Montagut.

Sabate la 4-an, grupo de lokuloj kaj vizitantoj promenadis, sekvante la lokojn reliefigitajn en la verko "Bohemiaj lumoj" (*Luces de bohemia*) de Ramón M^a del Valle-Inclán, sub la gvido de Miguel Fernández. Temis iasence pri ripeto de la "Bohemia nokto", kiun oni ĝuis dum la Iberia Renkontiĝo de la jaro 2013. Je la fino ni haltis por fotiĝi kun alia teatra heroo, Federico García Lorca. Kaj kiel kolofono, la verkisto kaj poeto Jorge Camacho verkis la suban poemon:

Madrido 2

Nicola en Madrido nin vizitas
komence de oktobro plu somera,
kaj ni, kanajloj de la grup' ibera
kun li poeziecon kundividas.

Ni konversadas, drinkas, kantas, ridas
kaj, en groteska horo fru-vespera,
laŭ verko de dramisto plej libera,
Miguel Fernández nin elstare gvidas.

Kaj nun, sub same anemiaj lumoj,
ni drivas tra ĉi urbo da sordido,
tumulta kaj fripona kaj senpeka.

La dramtitolo: *Bohemiaj lumoj*.
La loko: ombraj stratoj de Madrido
en la aŭroro de l' jarcent' dudeka.

HEF

ESPERANTO KAJ UNIVERSITATO EN VENONTA ANDALUZA KONGRESO

Komence de novembro, la asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, okazinta en Malago, decidis ke la 19-a Andaluzia Kongreso de Esperanto okazos dum la semajnfino de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro de 2015 en la urbo Jerez de la Frontera.



La temo de la kongreso, pri kiu temos preskaŭ ĉiuj programeroj estos “Forumo: Esperanto kaj Universitato”, tiel oni studos la eblecojn, rimedojn kaj agadojn celantajn la agnoskon de esperanto ĉe la Universitato, por konfirmi la konon de lingvo kaj eĉ por studi la eblecon enirigi la internacian lingvon ene de universitataj post-gradaj kursoj. temas pri grava agadlinio entreprenita de AEU, kun la apogo de Hispana E-Federacio, kaj kiu ricevis fortan antaŭenpuŝon post la okazigo de la Andaluzia kaj Hispana Kongreso de Arundo, kaj por kiu oni deziras kalkuli je la kunlaboro de la esperantista universitata komunumo en Andaluzio kaj la cetero de Hispanio.

Kompreneble, ankaŭ oni organizos dum la Kongreso pliajn kulturajn aktojn, turismajn vizitojn, ktp. Kaj ĉio ĉi en la internacia lingvo Esperanto. Baldaŭ oni informos pli detale pri la okazigo de la kongreso, nun, ni petas al vi rezervi tiun daton por ĉeesti kaj partopreni en la Andaluzia Kongreso de Esperanto, la plej grava esperantista evento okazanta en la sudo de Eŭropo.

José María Rodríguez

DU PRELEGOJ PRI LA ĈIELO KAJ PRI ESPERANTO

La 17-an de novembro okazis du sinsekvaj prelegoj pri Astronomio, fare de la astronomo David Galadí-Enríquez, en la Hispana Kultura Centro Antonio Machado de Luksemburgio. La speciala trajto estas ke unu okazis en la hispana, alia en Esperanto.

La hispanlingva prelego temis pri ‘Kuriozaĵoj en la ĉielo observita nudokule’. Antaŭ tiu konferenco en la hispana, David prelegis samloke en Esperanto, invitate de la esperantista komunumo de Luksemburgio.

David Galadí-Enríquez estas astronomo kaj laboras en la Hispan-Germana Astronomia Centro (Observatorio de Calar Alto, en la provinco Almerio). Doktoro pri Fiziko, li estas aŭtoro de diversaj publikigaĵoj sciencaj kaj disvastigaj, inter kiuj "La kosmo kaj ni", unu el la plej elstaraj verkoj pri populara scienco en la internacia lingvo, kune eldonita de Fundación Esperanto, el Zaragozo, kaj Flandra Esperanto-Ligo.

Kuriozaĵoj pri Svislando

Mi vojaĝis al Svislando la pasintan someron, cirkaŭ la unua semajno de aŭgusto. Tie frapis min kelkaj strangaĵoj, kiuj povas esti tute normalaj por lokanoj sed kiuj estas okul- aŭ orelfrapaj al eksterlandanoj. Mi prezentos tiujn aĵojn aŭ okazaĵojn tute sen kronologia aŭ grava ordo.

Ĝuse alveninta en Ĝenevon, mi rimarkis reklamaĵon, iom komikan, kiu atakis la francojn. Ĝenevo estas franclingva urbo, sed ĝi sentas ĝin ege svisa. Ĝi estas la diplomatia ĉefurbo de la lando.

Troviĝas tie sidejo de Unuiĝintaj Nacioj, la dua plej grava post la novjorka. Eblas viziti ĝin sed ĝi ne estas la unua vidindaĵo de la urbo. Ĝuste apude vizitindas la muzeo de la Ruĝa Kruco. Ĝi montras la historion de tiu organizo abunde kaj klare. Elstaras la sekcioj pri prizonuloj kaj malaperintoj dum la Dua Mondmilito, pri la genocido en Ruando kaj pri artaĵoj realigitaj de politikaj prizonuloj de la tuta mondo.

Ne tro for el tiu kvartalo situas la palaco Wilson, kiu estis la sidejo de la Socio de Nacioj, kiu fiaskis antaŭ la Dua Mondmilito, sed kiu almenaŭ anoncis la volon krei tutmondan interkonsentan politikan organizon.

La horloĝa ateliera industrio enradikiĝis ĉefe en la montara regiono Jura, kie 80% aŭ 90% de la svisaj horloĝoj oni produktas. Sed en Ĝenevo oni trovas la grandajn markojn. Ankaŭ grandajn bankojn, kvankam Zuriko estas la financa ĉefurbo. En Ĝenevo mi vidis pli da luksaj multekostegaj aŭtoj ol ie ajn antaŭe (kvankam estas vere, ke mi ne iris al Monako).



La ĝeneva simbolo tamen estas natura. Temas pri la lago Léman, kiuj la ĝenevanoj nomas Ĝeneva, sed tio kompreneble ne plaĉas al la loĝantoj de aliaj ĉe-lagaj urboj kiel tiuj de Laŭzano (*Lausanne* franclingve).

Meze de la Ĝeneva parto de la lago estas senĉesa ŝprucfluo, malfacile entute fotebla pro ĝia alteco.

Unu el la trajtoj kiuj difinas svisojn estas Rivella. Ĝi estas senalkohola trinkaĵo kun karbonata acido, kiu

enhavas 35 % selakton, kiu estas fermento en la stomako de laktantaj bestoj. La nomo "Rivella" venas de la komunumo "Riva San Vitale" kaj ankaŭ de itala vorto "Rivelazione", sed ŝajnas, ke por kontentigi la franclingvanojn kaj la germanlingvanojn oni ofte adoptas italsajn vortojn por nomi produktojn en Svislando.

Koncerne al transporto, la svisa trajnreto estas tre densa kaj efika. Amuze, unu el la trajnoj, kiujn mi devis preni eliris 15 minutojn malfrue, kio estas multege por tiu akuratega lando. La homoj povas esti flekseblaj, sed kutime alveni malfrue, eĉ se unumminute, estas malĝentile. La homoj povas atendi je la alia flanko de la strato por alveni je la precisa interkonsentita horo.

Infanoj kaj junuloj kiuj loĝas en kamparo ofte iras lernejen per trajno. La trajnvojoj iras laŭlonge de la aŭtaj vojoj kaj de linioj de laktbovinoj, kiuj rigardas la trajnon seninterese.

Vojaĝi trajne estas multekoste, kiel preskaŭ ĉio alia en Svislando, sed per trajna "pasvorto" eblas pagi por veturi libere kaj senzorge dum unu semajno. La eble nura negativa trajto, kiun mi memoras estas la voĉo, kiu anoncas la haltejojn. Evidente, kiam la voĉo estis nur germanlingva mi ne kapablis kompreni multe, sed aldone la voĉo estis ĉiam monotonega kaj mallaŭta. Mi eĉ devis demandi al vojaĝanto, pri kiu haltejurbo temis en unu okazo.

Mi ne esploris restoraciojn sed povis observi tion, kio okazas pri superbazaroj. Abundas la arojn Migros kaj Coop. Grandaj firmaoj kiel Carrefour koplodis eniri la svisan merkaton sed devis fermi ĉar la konsumantoj ne bojkotis ilin, sed simple ne aĉetis tie. La svisoj havas profundan senton de nacia interkonkretata ekonomio. Eĉ kiam iu varo estas pli multekosta, ili preferas elspezi en svisaĵoj. La produktoj Migros etendiĝas je ĉiaj sektoroj. Se vi kredas, ke estas multaj produktoj Hacendado, vi povos trovi ĉe Migros svisajn ĉiofarilojn, kuirilojn, ĉiajn manĝaĵojn, ĝardenilojn, ktp. Migros vendas se eblas ĉefe svisajn produktojn.

Aliflanke, surprizis min scii, ke por pruntepreni librojn aŭ aliajn kulturaĵojn el biblioteko almenaŭ en Lucerno, sed ŝajne tre ofte en la germanlingva Svislando, oni devas pagi almenaŭ po 1 svisa franko ĉiufoje. Nur kelkaj tagoj post mia reveno, mi aŭdis, ke oni proponas, ke la bibliotekoj pagu al aŭtoroj pro iliaj pruntedonaĵoj. Tio ĉi ne samas sed alproksimiĝas al tiu tendenco.



Fine, mi parolos pri la armeo. Milit servo estas deviga por ĉiuj svisaj viroj devas de tempo al tempo revizii siajn konojn. Junaj armeaj trejnantoj povas vojaĝi senpage se ili portas la uniformon do oni vidas ilin trajne. Strangas tio por mi ĉar en Hispanio ĝi ne plu estas deviga.

Svisio estas neŭtrala lando, sed ĝi posedas montojn, kiuj enhavas misterajn kaŝejojn, de kie neatendite povas ekflugi militajn aviadilojn.

Se vi volas scii pli, laŭ humura perspektivo, pri la diversaj lingvaj komunumoj, mi konsilas al vi

spekti la videon de Marie-Thérèse Porchet, rolulo kreita de svisa komikisto, kiun tre baldaŭ mi subtekstigos ankaŭ en Esperanto:

<http://www.amara.org/cs/videos/8WqMIQ3br6O2/fr/868046/>

Rivella:

http://www.rivella.com/ch/fileadmin/user_upload/Download_Box/Rivella_Packshots/

Rivella_Glas.jpg

Eduardo Berdor

INTERVJUO AL LA NOVA PREZIDANTO DE HEJS ALEX ESCOBEDO

Sekve al lia patriĝo, pri kiu ni informis en antaŭa Bole-
tin, la ĝisnuna prezidanto de Hispana Esperantista Jun-
lara Societo (HEJS) prezentis sian demision, por lasi
lokon al nova generacio de junaj aktivuloj. Kiel nova
prezidanto estis elektita Alejandro Escobedo, juna ma-
drida esperantisto, membro de nia asocio.

Boletín intervjuis lin pri lia esperantista vivo kaj liaj
planoj"

**-Saluton, Álex, kiel nova prezidanto de HEJS mi
interesiĝas pri via dispozicio realigi tiun gravan la-
boron, ĉar vi estas relative nova esperantisto, kion
vi respondas?**

-Kiel nova hejs-prezidanto mi ŝatus ĉion ĉi:

Renovigi la logoon (Ĉiuj konsentas. Kaj nun la frato de
Chus enirus en HEJS kaj helpas kiel grafikisto). Kunla-

borigi la jamajn membrojn kiuj ne vere profitis de HEJS (ĉar almenaŭ al mi HEJS nenion alpor-
tis, ja HEF kiel al ĉiuj membroj). Minimume proponi krei venontjare renkontiĝon semajnfina-
por junuloj, ne tro malfacilus elekti iun lokon kun tendaro aŭ simile kie amuziĝi.

Renovigi la informilojn (ni havas jam unu danke al kunlaboro kun Enric, sed mi ŝatus iom testi
ĝin surstrate, demandante homojn kion ili prifajfas kaj kio ne, kion ili ŝatus scii kio mankus en la
informilo se ili interesiĝus pri E-o, ktp. Printi la informilojn kaj sendi poŝte al la membroj kiuj
volas pligrandigi la esperantistaron en sia ĉirkaŭaĵo. Ni devus pristudi kiel agi surstrate, kien
plej bone iri (ĉu ĉe alt-lernejaj pordoj pli sukcesos?) ktp.

Realigi ian enketon pri kontento al ĉiuj membroj (ankaŭ al hefanoj) ĉar ĝi utilos. Kiel ili ekkonis
esperanton, kiom da tempo ili studis kaj ilian nunan nivelon, kion ili ŝatas de la nuna asocio, kion
ili plibonigus, kiun servon ili volus. (Nu, pripensotaj demandoj).

Nomumi membrojn por fari kelkajn tasketojn ankaŭ bonegus, kaj iom post iom informi pri la
sukcesoj, kaj la homoj kiuj laboris por tiu sukcesoj.

Kunlabori kun Instituto Fina Venko, indus krei ian censan mapon kiel la valencia asocio por
montri kie (pli malpli) loĝas esperantistoj kaj montri ke ni ja ekzistas.

**-Via respondo estas sufiĉe longa kaj klariga, dankon, mi opinias ke vi pretas agi kiel res-
pondeca prezidanto kun bonaj projektoj. Mi havis kelkajn demandojn pliajn, sed vi jam
respondis sufiĉe klare kaj mi faros nur la lastan:
Kion pri vi kaj Esperanto? Kiam vi eklernis ĝin?**

-Pri mi kaj Eo:

Jam pasis 4 jaroj ekde mia eklernado. Mi lernis ĝin dum eble kvin monatoj (t.e. legis kursojn)
kaj de tiam mi nur praktikis per FB precipe (mi devus plulegi la PPPn...).



- **Mi scias ke vi trapasis senprobleme la nivelon C1, tio pravas ke vi estas bona studanto de la lingvo kaj certe tre inteligenta.**

-Jes, mi trapasis la C1 nivelon, kaj en mia atesto mi povos diri ke eĉ sen studi (se temus pri la angla aŭ alia nacia lingvo mi ja devus studi kelkajn semajnojn...). Mi nebulas memoras la malkovron, iel danke al Vikipedio. Mi kredas ke mi vidis ĝin en la flanko kolono kie aperas alilingvaj versioj de artikoloj. Esperanto apudas al la angla kaj la hispana (English|Español|Esperanto) kaj mi neniam vidis la nomon de tiun lingvon, do tuj legis la artikolon pri Esperanto, poste la artikolon pri la pedagogia valoro (ĉu enmetinda ligilo en HEF-retejo?) kaj decidis eklerni ĝin hejme, ĉar mi pensis ke ĝi ŝajnas interesa lingvo kaj mi ne perdus tempon laŭ la artikolo, ĉar mi rapidigus la akiron de la germana lingvo, kiun mi ekstudis tiun monaton en la universitata (mi ĵus komencis la karieron).

Ĉion bonan al vi por la novjaro!

-Reciproke nome de la Redakcio.

Poezia Angulo

Hipokrito

Hipokritan rideton,
kaj malican rigardon,
mi rimarkas kun timo.
Mi plutenas kvieton
kaj kun granda trankvilo
mi klopodas forigi
ĉi vanaĵan fiaskon.

Estas tre malfacile
babiladi kun pravo,
sed kun fid' kaj espero
kaj kun klera rigardo
mi trapasos obstaklojn,
ĉar mi fidas al saĝo.

Ángel Arquillos



LA LIRIKA VOĈO DE MARÍA ÁNGELES MAESO ESPERANTIGITA

María Ángeles Maeso (Valdanzo, Soria, 1955) estas unu el la gravaj kaj altkvalitaj voĉoj de la hispana nuntempa liriko. Licenciulo pri hispana filologio, ŝi instruas hispanajn lingvon kaj literaturon en gimnazio, kunordigas soci-kulturajn programojn sur la tereno de la socia marĝenigo kaj praktikas la literaturan kritikon ĉe diversaj amaskomunikiloj. Ĝis nun ŝi publikigis, krom diversaj rakontoj, sep poemkolektojn. Pri ĉi lastaj, emfazindas, ke ŝi ricevis: en 1990 la premion de poezio Jorge Manrique pro sia poemaro *Sin regreso* (Sen reveno) kaj en 2003 la premion de poezio Omaĝo al León Felipe pro *Vamos, vemos* (Ire, vide).

Kun María Ángeles Maeso mi konatiĝis pasintnovembre, kadre de aranĝo kun depostula karaktero far la madrida Internacia Junulargastejo San Fermín, institucio, kiu, kiel sciante, kor-karese simpatias nian aferon. Antaŭ multaj jaroj la madrida magistrato promesis starigi tie publikan bibliotekon por la kvartalo San Fermín. Sed la promeson forportis la vento. Kiel kutime. Tamen la najbaroj batalas plue por sia biblioteko. Apoge al ili, multaj intelektuloj kaj artistoj, kelkaj el ili tre konataj, subskribis manifeston. Ankaŭ ni E-verkistoj estis petataj ĝin subskribi. Entuziasme Jorge Camacho kaj mi mem faris tion, kion, cetere, ni rigardis honoro.

Ĉi-kuntekste la junulargastejo organizis konkurson pri rakontoj surbaze de la temo “Kvartalo por biblioteko kaj biblioteko por kvartalo”. Maeso estis unu el la gravaj verkistoj konsistigantaj la concernan jurion, inter kies membroj troviĝis ankaŭ du esperantistoj: Mati Montero kaj mi mem. Jen plia honoro. La 14an de novembro havis lokon la disdono de la premioj. Tio ebligis al mi konatiĝi kun la poetino.

Jam de la komenco, Maeso montris grandan simpatian kaj grandan admiron al nia lingvo kaj al niaj idealoj. Ŝi donacis al mi ekzempleron de sia poemaro *Vamos, vemos* (Ire, vide). Kaj mi lasis min kapti de ŝia poezio kaj esperantigis plurajn el la poemoj de tiu kolekto. Unu el ili, *Formikoj*, mi prezentas al vi ĉi-okaze. Temas pri am-poemo. Ĝin la poetino lokas en io tiel simpla kaj eta, sed samtempe tiel magia, kiel formikejo, per kio ŝi nobligas kaj gigantigas la temon ekster ajna stereotipo. La tuta poemaro aperas loĝata de bestoj: kolomboj, vespertoj, ratoj, ŝafidoj, cikonioj, turstrigoj... Ja uzi bestojn kiel metaforojn permesas al la poetino praktiki, per sia fajna, sobra kaj trafa plumo, socian poezion en la antipodo de ajntipa pamfleto.

Bele, se vi ŝatos jenajn versojn de María Ángeles Maeso, kiujn mi plezure esperantigis:

FORMIKOJ

Ni tre ofte surpaŝas formikejojn.
Aŭ subite sparko nia tien falas.

Kaj ni scias, kio okazas ene.
Kaj ni scias, kiun ĉiu formiko serĉas,
eskapante el la fajro.

Ĉar mi memoras, ke iam
ni teruritaj nin interrigardis,
mi sonĝadas ofte,
ke interserĉas nin ni kiel ili.

Ofte mi, samkiel la formikoj,
kiuj meze de fajro
serĉas sian parulon, pri vi pensas



Miguel Fernández

[aliaj] **LIRIKAJ PERLOJ...** de Antonio Marco Botella


“Hispana Lirika Antologio” estas invito al vojaĝo. Antonio Marco Botella, amanto de Esperanto kaj beletro, proponas al ni promenadon tra la ĝardeno de la hispana liriko. Tiel, ni spertas la ŝancon gustumi kaj flari allogajn florojn en esperanta parfumo. Iel, oni povas konsideri ke la leganto mem estas abelo eme al floro-belo (permesu al mi la allogo de la rimo).

La libro “Hispana Lirika Antologio” estas verko pri kiu Antonio laboradis de antaŭ multe da tempo. “Antologio” de Antonio: logika afero, ĉar ambaŭ vortoj etimologie devenas el la greka vorto “ἄνθος” (“floro”). Plurfoje, Antonio Marco flaris (kaj flarigis) tiajn florojn, faris prelegojn, prezentis artikolojn kaj legis tradukojn diversajn pri poemoj kaj poetoj el la hispana liriko. Komprenoble, la amplekso kaj enhavo de tiu projekto povus multe varii. Tamen, en nia societo *Frateco*, post gustumado de diversaj eroj kaj rigardado de la materialoj, ni konsideris ke certe jam indus alveni al presita papero kaj ni decidis publikigi ĝin.

Antonio Marco veturigas nin tra 288 paĝoj al pli ol 38 verkistoj kaj anonimaj verkoj: Ekde la unuaj momentoj de la hispana liriko (harĉoj kaj zeĝeloj), romanoj... traitante inter famaj figuroj (Gonzalo de Berceo, Jorge Manrique, Sankta Teresa de Ávila, Fray Luis de León, Sankta Juan de la Cruz, Góngora, Lope de Vega, Quevedo...) kaj aliaj ne tiom famaj (Fernando de Herrera, frajtoj Argensola...), alvenante fine al Federico García Lorca, Rafael Alberti, Miguel Hernández...

Antonio Marco Botella (Callosa de Segura, Alikanto, 1921), loĝanta en Zaragozo, dediĉis sian vivon al Esperanto, kiel instruisto, verkisto (elstaras liaj libroj pri movado kaj historio kaj pri beletro kiel “Lirikaj perloj el Al-Andalus”), redaktisto (de “Boletín” kaj “Kajeroj el la Sudo”) kaj

respondeculo de organizoj (*Frateco* kaj *Fundación Esperanto*). Nun la lasta libro estas lia 14a kaj aperis en 2014 okaze de la Zamenhof-Tago (“Libro-Tago”).



La lirikaj perloj estas akompanataj de komentoj pri la verkoj kaj la verkistoj. Aperas enkondukoj pri la vivo kaj agado de la verkistoj kaj tradukoj al Esperanto de multaj poemoj. Enestas kompleta iu iomete longa verko de Bécquer, “La militestro de la ruĝaj manoj”, fakte kvazaŭ poemo en prozo bazita en orienta legendo.

Kiel subjektiva konsidero, mi estus dezirinta pli da spaco al poetoj el hispanlingva Ameriko. Nur aperas Sor Juana Inés de la Cruz (naskiĝinta en Meksiko). Persone, mankas al mi José Martí (mirinda

poeto kvankam malfacilege tradukebla) kaj Octavio Paz. Bone, iel la kovrilo povas esti omaĝo al tiaj poetoj ĉar aperas bela monumento dediĉita al Rubén Darío kiu troviĝas en “Parko Granda” en Zaragozo. Temas pri “Infano kun stelo”, bildo kiu por esperantistoj estas speciale signifa.

Fernando de Diego diris ke en la tradukoj de K. Kalocsay en “Tutmonda Sonoro” malabundis hispanaj poemoj, kaj eĉ en lia poem-antologio hispana “Sentempa Simfonio” mankas multegaj poetoj, ekzemple Rafael Alberti, Blas de Otero... Miguel Fernández elstare alportis valorajn verkojn sur tiu tereno. Kaj nun, Antonio Marco donacas al ni alian kontribuon bonvenindan. Kiel eroj jen sube perloj (spicaj specimenoj). Por fini, jen la lastaj vortoj de F. de Diego en lia enkonduko de lia antologio: “Sed jam sufiĉe! Senplie apertu la pordon kaj venu en ĉi mirindan mondon, kie amo, ĵaluzo, morto, sopiro, mistikismo, sarkasmo kaj ceteraj homaj emocioj montras la apartan stampon de la talento kaj la temperamentoj hispanaj”.

Mirindaj du sonetoj kiuj vibras ĉirkaŭ la granda Sono de la Amo.

Lorenzo Noguero

Kaj jen la du perloj:

*Kuraĝi, sveni, senti sin kolera,
acida, tolerema, milda, ĝena,
kontenta, morta, viva kaj ĉagrena,
fidela, fia, tima aŭ tenera.*

*Supozi nur en bon' l' ekziston vera,
aperi gaja, trista, fidoplena,
aŭdaca, ofendita, forta, svena,
ĵaluzo, digna, simpla aŭ fera...*

*Postulas ankaŭ tiu amosento:
venenon trinki kvazaŭ dolĉan vinon,
ĉielon ĝui en inferturmento,*

*por elreviĝo doni mem l' animon,
la vivon sen perfort' kaj violento..
jen am': laŭ homo spertis l' amfascinon.*

Lope de Vega

*Ĝi estas neĝ' kaj fajro, frida varmo,
glaci' kaj brulo, vundo ne dolora,
feliĉa rev' kaj tamen plej angora,
ripoz' laciga kaj ĉagren' kun ĉarmo...*

*Ĝi estas tim-kuraĝo, rid' kaj larmo,
profunda sent' en la silent' sonora,
senzorgo kun impulso tre fervora,
ja tio estas pura Am' sen garno.*

*Ĝi estas plenliber' en mallibero,
kaj kredas amikecon tute vana,
plezuron sentas ene de l' sufero...*

*Amor' ĝin skuas, ofte uragana,
ĝi estas Paradizo kaj Infero,
espero, vivo, mort' kaj flam' vulkana!*

Quevedo

Lastminuta alloga novaĵo por poetoj!

Pro manko de spaco ni nur povas faciligi al la legantoj, la ligilon pri poezia itala konkurso:

POEZIO EL ĈIUJ ĈIELOJ

LIMDATO: LA 21-a DE MARTO 2015

Per ĉi suba ligilo vi trovos ĉion necesa por partopreni la konkurson.

<http://iconcorsidisamideano.altervista.org/KonkursoPoemojII.html>

DUA KONKURSO PRI RAKONTOJ DE “LOS PINOS DE RETIRO”

Kiel mi anoncis, ni publikigos en sinsekvaj numeroj de Boletín miajn esperantigojn de la verkoj premiitaj en la Dua Konkursko pri Rakontoj organizita de la madrida najbar-asocio Los Pinos de Retiro. Jen la rakonto, kiu ricevis la unuan premion. Bona laboro! En ĝi, promeno far la aŭtoro, Alfredo López Carrillo, tra la stratoj de madrida kvartalo fine de la kvardekaj jaroj transiĝas al dokumenta priskribo de la socia situacio tiutempa. Simple, rekte, senartifike, aŭtente, kvazaŭ temus pri blanka-nigra kurta filmo el la itala novrealismo. Estis al mi vera plezuro esperantigi ĉi tekston, kiu, mi certas, konkeros viajn korojn. Miguel Fernández.

TRA LA KVARTALO

Mi sobiras la ŝtuparon saltante po tri ŝtupojn. Mi ne havas urĝon, sed el tio mi faris jam kutimon.

Mi alvenas al la stratpordo manĝante mian pecon da pano trempita en oliv-oleo kaj kun iom da sukero.

Tra la pord-arko eniras la suno de la mateno de brila maja tago, kaj surstrate du hundoj ludas je reciproka vostomordado levante etajn polvonubojn el la tero, ĉar mia strato ne estas asfaltita, eĉ ne pavimita, kaj el tio sekvas, ke en epoko de pluvoj mi devas demeti la piedvestojn kotmakulitaj antaŭ ol eniri en mian domon sur la unua etaĝo.

Mi soriras sur la eta deklivo salutante la najbarinojn, kiuj ĉe la pordo de siaj malaltaj domoj skuas etajn alfo-matojn, senkolorajn militistajn plejdojn kaj aliajn polvoplenajn tukojn.

Mia strato komenciĝas, aŭ finiĝas, ĉe la strato Melquíades Biencito, ĉe la eta kvadrata placo, kiun formas la preĝejo Sankta Rajmondo (la patrono de la naskantinoj), la flanka fasado de la kinejo Frutos (la palaco de la sunflorsemoj), la granda ruĝa-brika mur-peco kun grandaj fenestroj de la publika lernejo de la kvartalo kaj, kiel kvara flanko, la fasado de la butikoj de mansakoj kaj tanaĵoj Osuna kaj la domego de la familio Brea, kiu mastras tenejojn por konstru-materialoj.

Ĉe la angulo formita de la preĝejo Sankta Rajmondo kaj la juĝejo staras mia kunulo Nani, alnome la Vinkelo.

Ni nomas lin Vinkelo ne tial, ke lia familio sin dediĉus al la komerco de vino aŭ havus vinvendejon, sed ĉar lia nomo estas Fernando Vinkelo.

–Saluton, Platnazulo –li salutas min.

–Saluton, Nani, ĉu ferio en via lernejo’?

–Ne. Mi iris tien kiel ĉiutage, kaj oĉjo Panĉo min eljetis.

–Nu, kial?

–Ĉar mi devintus prezenti laboron, kiun hieraŭ li taskis al ni, kaj ĝin mi ne faris.

–Kial do? Kutime vi ŝvitas super la taskoj.

–Jes, sed hieraŭ mi rehejmiĝis malfrue el prenado de fulgo el la trajna trako kaj, ĉe mia alveno, ŝtormis hejme. La gepatroj kverelis kaj, kiam ili kverelas, mi provas malaperi. Mi foriris al Serĉjo kaj, kiam mi revenis, iris rekte en la liton.

–Nu, kiel merdulas oĉjo Panĉo!

–Jes, Platnazulo, li merdulas kaj, krome, batas nin. Ĉu oni batas vin en via lernejo?

–Ne! Nu, de tempo al tempo sinjoro Bazilo donas al la malplej aĝaj sekan repon, kiu skuas ilin, sed sinjoro Rajmondo ne batas nin. Li estas bona instruisto. Ek, Nani, kontraŭ faro farita ne helpas medito! Ni promenu tra La Presilla. Ĝis tagmezo ni havas sufiĉe da tempo. Poste mi devas viziti la kuraciston.

–Kio estas al vi? Ĉu vi misfartas?

–Ne! Onidire, mi suferas de ganglioj.

–Kaj kio estas tio?

–Tion, je la diablo, mi ne scias! Kiam mi vizitas la kuraciston, li ‘aŭskultas’ min per la gumaj tuboj, preskribas siropon kaj diras al mi, ke mi ne laciĝu. Ĉiam estas same!

Ni iras apud la pordo de la kinejo Excelsior kaj haltas por komenti la programon. Oni prezentas du filmojn: unu vakeran; la alian, pri Fu Manĉu.

Ĉe Karlo, la nutraĵvendejo ĉe la strat-angulo, ni aĉetas paperkorneton da “piĉetoj”.

Manĝante ilin avide, ni pasas apud la gazetkiosko de Nikolĉjo, mia najbaro.

–Kiel vinagran vizaĝon havas via najbaro Nikolĉjo!

–Se temus nur pri la vizaĝo... Liaj faroj des pli aĉas. Kiam li venas hejmen ebria, t.e. ĉiutage, li komencas merdule frapi Luison kaj Rozan, la gefilojn, kaj, se la patrino provas protekti ilin, ankaŭ al ŝi li tanas la haŭton.

Post la kiosko staras la enirejo de la metrostacio (Puente de Vallecas). Preskaŭ neniu eniras aŭ eliras. Komprenible. Ne estas la tempo de iroj al aŭ revenoj el la laboro.

Sur unu el la unuaj ŝtupoj de la ŝtuparo kondukanta al la kajoj sidas olda “cigared-stumpisto” kun plurtaga griza barbo kaj bereto iame nigradrappa sed nune brila pro la grastavoloj, kiuj sur ĝin akumuligis. Li pretigas serion da cigared-stumpoj, kiujn sendube li esperas vendi kontraŭ unu aŭ du pesetoj. Tio dependos de la malsato de la stumpisto aŭ de la nepro fumi sentata de la aĉetunto.

Ĝuste fronte al la elirejo de la metrostacio, ĉe la angulo formita de la granda fenestro de la Centra Kafejo kaj la apoteko, tri knabinoj kun tolsakoj pendantaj ĉirkaŭ iliaj brakoj proponas siajn varojn: “soldat-bulkojn”. Blankan panon, kiun sendube ulo iĝinta serĝento pro servo-jaroj ŝtele eligis el la proksima kazerno ĉe Pacifiko.

Unu el la tri knabinoj, la plej juna, salutas nin. Nani reciprokas.

–Ĉu vi konas ŝin? –mi demandas lin.

–Jes. Ŝi estas vicluanto de ĉambro de sinjorino Benita, kiu loĝas ĉe la fundo de mia korto.

–Kaj kio okazas? Ĉu ŝi malsanas?

–Ne, kial vi diras tion? Ĉu pro ŝia pritondita kapo?

–Jes.

–Nu, iu merda urba policano volas kuŝi kun ŝi kaj tial, ke ŝi rifuzas, antaŭ kelkaj tagoj li ŝin arestis kaj kunprenis en la kazerneton de la urbodomo. Kaj tie, kune kun paro da aliaj uniformitaj

¹Aludo al la iama hispana kutimo manĝi rostitajn sunflorsemojn dum spektado de filmoj.

ŝtipkapuloj, li fipalpis ŝin, tute pritondis al ŝi la kapon kaj igis ŝin trinki ricin-oleon. Sinjorino Franjo rakontis al mia patrino, ke la knabino revenis hejmen malfrunokte, plena de larmoj kaj mukaĵo, kaj vomanta.

–Kiaj putinidoj! Nani, ja ŝi plaĉas al vi, ĉu?

–Platnazulo, vi deliras. Ŝi avine oldas.

–Sed, kiom vi aĝas?

–Ĉu mi? Dek du jarojn.

–Ĉu vi estas do el 37? Same kiel mi. Mi pensis, ke vi pli oldas.

Interne de la kafejo, apud alia granda fenestro, tri klientoj babilas ĉirkaŭ pokaloj. Iu elstaras pro sia granda korpo kaj sia melongeneca nazo. Temas pri la sinjoro Saavedra.

–Ĉu vi konas la ĉapelulon? –min demandas Nani.

–Jes. Li loĝas ĉi-kvartale, ĉe la strato Gerona. Li estas provizanto ĉe la bazaro Legazpi. Mi kredas, ke li okupiĝas pri la terpomoj.

–Ha!, li estas la patro de More. Do via bopatro!

–Ne kretenu, Nani.

Je kelkaj metroj for de la Centra staras la Kafejo Avenuo. Tra ĝiaj grandaj fenestroj videblas la unupiedaj marmortabletoj sen homoj. Ni eniras en stretan vestiblon. Odoras je lesivo. Ni soriras la ĵus frotlavitan ŝtuparon kaj alvenas al la bilardejo sur la unua etaĝo, super la kafejo.

–Kion, je la merdo, vi faras ĉi tie je ĉi-tioma?

Elbojas Fraĉjo, la responsulo de la bilardejo, farante salton por disiĝi disde la knabino, kiu, kun la haroj lozaj, staras fronte al la fenestroj rigardantaj al la strato kaj dorse al la pordo, tra kiu tiel neoportune ni aperis. Sendube ŝi estas la knabino, kiu ĵus frotlavis la ŝtuparon.

–Ĉu vi ne devus troviĝi en la lernejo? Ek, forvelu! Mi ne volas vidi vin ĉi tie, vi tro junas ankoraŭ. Jam vi havos tempon friponi, kiam vi estos pli aĝaj.

Konsiderante la akcepton fare de Fraĉjo, ni ekkuras sob tra la ŝtuparo.

Alvenante al la strat-angulo, ni apogas niajn nazojn al la montrofenestro de Bela Lumo, la kukvendejo. Tra la drattolo de la fenestreto, kiu staras nivele de la tero, sub la montrofenestro, eliĝas laodoro de la delicaĵoj bakataj en la subtera etaĝo de la kukvendejo.

–Ĉu vi havas kelkajn kuprerojn por aĉeti al ni brioĉon?

–Eĉ ne unu groŝon! –jen la respondo de Nani.

–Komprenite. Do enspiru profunde, ke ankaŭ laodoro nutras.

Ĉe la sekva strat-angulo staras la tabakvendejo La Presilla, kiu rolas ankaŭ kiel loteriejo. Ĉe la pordo, grupo da revendistoj, kun siaj biletekonoj fiksitaj surĉemize per sekurpingloj, proponas “la fortunon” al la malmultaj homoj, kiuj je tioma horo de la mateno piediras surtrotuare.

Jen ni alvenas al la strato Gerona, kaj mi vidas la horon montritan de ligna horloĝo en la montrofenestro de la juvelbutiko La Rubeno. Estas dudek minutoj antaŭ tagmezo.

² *repo* (el la angla *rap*): bato sur la kapon per la meza artiklo de la longa fingro.

³ *piĉeto*: triviale, lupen-semblo (hispane, *altramuz*).

⁴ *putinido*: hispandevena insulto uzata kontraŭ abomenindaj fiuloj

–Nani, mi forsagas. Mi devas iri al la kuracisto je tagmezo, kaj restas nur dudek minutoj.

–Platnazulo, ne hastaĉu. Se via konsultejo estas tiu ĉe la strato Robles, vi uzos nur kvin minutojn por iri de via domo ĝis tie.

–Konsentite, ni sobiru tra la strato Robles, sed rapide.

Ni trafas la straton kaj, apenaŭ ni ĉirkaŭiras la angulon, forta odoro je frititaj mesoenteraĵoj kaj birdotripaĵoj skuas al ni la nazon kvazaŭ temus pri vera vespopiko.

–Damne, kia haladzo! Kia naŭzo!

–Atentu, ke vi ne vomu.

–Ĉu vomu? Neeble. Sendube miaj tripoj estas kungluitaj. Hieraŭ nokte mi ne manĝis kaj ĉi-matene mi trinkis duonan bovlon da orfa kafo. Nu, fakte ne kafo, sed “rekuiraĵo”!

Ni trafas la publikan fontanon, kie ni najbaroj de la kvartalo provizas nin per trinkebla akvo.

–Viahejme, Nani, kiu do zorgas pri la akvo? Ĉu vi aŭ la fratino?

–Ni alternigas nin, depende de tio, kiu staras en la domo, kiam malpleniĝas la siteloj. Kaj viahejme, kiu do devas enkaĉiĝi prie?

–Nu, mi. La patrino kaj la frato laboras eksterhejme kaj la avino jam tre oldas por tiaj aventuroj. Nu, mi forvelu. Sendube la avino igos min ŝanĝi la ŝuojn kaj zorge kombos min por ke mi vidiĝu “prezentinda”, kiel ŝi diras.

Kvartalo Vallecas, jaro 1949.

Miguel Fernández

ESPERANTO-VIDEOJ EL HISPANIO

Naskiĝis nova kanalo en Youtube, kun historiaj filmadoj pri la movado, nomata "Historiejo" <http://www.youtube.com/user/Historiejo>. Ĝi jam enhavas parolojn de Tibor Sekelj, Claude Piron kaj István Szerdahelyi, kaj ankaŭ historiajn artaĵojn, inter kiuj la tuta registrado de la teatra prezentado de la verko "Pikniko sur la batalkampo" de la hispana aŭtoro Fernando Arrabal, prezentita de Bulgara Esperanto-Teatro en 1987 en Zagrebo. Ĝuu ĉi tiun historian perlon en: <http://www.youtube.com/watch?v=ieveSGVvXBI>.

La apero de la kanalo ŝuldiĝas al la senlaca laboro de Miguel Gutiérrez Adúriz ("Liven Dek"). Li ankaŭ prizorgas aliajn kanalojn, inter kiuj la oficiala de Hispana Esperanto-Federacio <http://www.youtube.es/esesperanto>

Inter la plej ĵusaj videoj oni povas rekomendi:

Turismo per literaturo kaj Esperanto: Miguel Fernández gvidas nin tra diversaj madridaj scenejoj de la verko "Bohemiaj lumoj" de Ramón del Valle-Inclán http://www.youtube.com/watch?v=0FE_MXnNHnQ

Prelego de Nicola Ruggiero en la sidejo de HEF, pri la kolosa epopeo "La poemo de Utnoa" de la katalunia verkisto Abel Montagut <http://www.youtube.com/watch?v=BBQbfomyODA>
Resumo de la lasta SAT-Kongreso en Bretonio: <http://www.youtube.com/watch?v=ZmrE4MUzBo0>

Zlatko Tišljar rakontas anekdoton pri esperantista vivo: Kial esperantistoj fidis al nekonaĵoj? <http://www.youtube.com/watch?v=2lgXzgiA0KI>

Kaj fine, Liven Dek mem montras aliajn siajn talentojn per monologo "Konsilu min, Doktoro Zamenhof" <http://www.youtube.com/watch?v=2rjSkPVE0gE>.

Abonu niajn kanalojn, kaj vizitu ilin ofte. Oni senĉese trovas juvelojn.

NEKROLOGE

Gabriel Mora i Arana forpasis...

Naskiĝinta en la jaro 1925, poeto, bona verkisto en la kataluna kaj esperantaj lingvoj. Li esperantistiĝis en la jaro 1951, post la fino de la de Dua Perkorrespondanta Kurso gvidata de la kompetenta lingvisto Delfi Dalmaŭ.



Li gvidis plurajn E-kursojn, kaj li estis plurfoje prezidanto de la Juĝkomisiono de la *Floraj Ludoj*.

Kiel verkisto en la kataluna kaj esperanta lingvoj li estis plurfoje premiita, kaj kiel poeto li gajnis la Unuan Premion pri Poezio en la Jubilea Hispana Esperanta Kongreso okazinta en 1964; ankaŭ Unua Premio pri Prozo en la Konkursoj "Luis Hernández" kaj "Comella-Bassols" en 1965.

Krome li estis premiita en poeziaj konkursoj de *Barcelona Esperanto-Centro*, *Amics de l' Unesco*, *Centro de Lectura de Reus*, *Floraj Ludoj* en Villafranca de l' Penedes, kaj en Caracas (Venezuela), krom pluraj premioj en la kataluna lingvo.

Gabriel Mora i Arana estis Sekretario de la Internaciaj Floraj Ludoj ekde la reokazigo de tiuj Konkursoj en Tortosa en 1978. Li publikigis multnombrajn prozajn artikolojn kaj poemojn en diversaj periodaĵoj, kaj en 1985 li apartenis al la Redakta Stabo de la internacia prestiĝa revuo *Literatura Foiro*.

Salvador Gumá, bona amiko kaj tre inteligenta homo, fidele portretis lin per jena poemeto:

Sen diplomo nek titolo,
armite nur per forta volo
li leviĝis kaj nun trilas;
spronas lin tre granda koro
kaj li, herbeja bela floro
poezie alte brilas...

Gabriel Mora i Arana estas sendube unu el la plej bonaj poetoj de la Kataluna Esperantista Liriko. La forpaso de tiu ĉi eksterordinara esperantisto doloros al la tuta esperantistaro.

Antonio Marco Botella

LASTA-HORA NOVAĴO PRI ESPERANTA MUZIKO



Se vi ŝatas bonan muzikon, **Jak Le Puil** ofertas ĝin kun partopreno de **JoMo**, kiu ne nur ludas gitaron, sed balalajkon, kaj ankaŭ de **Pjer Buvje**, per kontrabaso, **Jean-Claude Patalano** per aldo-kaj soprano-saksofonoj, klarneto, kaj koncert-fluto kaj **Yo** (de grupo **Brassen's Not Dead**) per drumoj, interalie. Mi certe ke ĝi kontentigos la plejajn frandemulojn.


Vi trovos ankaŭ tri 'tradiciajn' titolojn: 'Ho belulin' en traduko de **Renato Corsetti**.

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi la KoDiskon iru ĉe reta diskoservo: <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd124&Ing=e>

Jim PETIT, per sledgitaro kaj inspirita de la klasika hinda muziko, kiun li studis sub **Pandit Ŝri Kriŝna Ŝarma**, influa hinda gitaristo, kreis ĉi lastan KoDiskon **KARMA**, frukto de longa enprofundiga laboro de lia aparta gitar-teknikokaj demuziko ĝenerale. La muzikaĵoj de ĉi tiu nova albumo estis komponitaj el la ritmaj cikloj de la klasika hinda muziko nomita tĥalas. Poste venas la melodio kaj la muzikaj modaloj kiujn Jim ellaboras el la melodiaj kadroj de la rĥagas de Norda Hindio. Eblas difini lian uzikon kiel la renkontiĝon de la muziko de **Ravi Ŝankar** kaj de **Pink Floyd**.

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi la KoDiskon iru ĉe reta diskoservo:

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd123&Ing=e>



Martin prezentis sian novan grupon '**La Talpoj**', en 2007 kun la albumo "**Pli ol nenio**", kaj sep jarojn poste ili prezentas al ni "**Superbazaro**", la frukton de tiuj jaroj da skribado, komponado kaj registrado.

Kiel en la unua albumo de la Talpoj, la kantoj en "**Superbazaro**" kovras bastan gamon de tonoj, subtile ligante akustikajn sonojn, tenerajn kaj folkecajn, kun la energiaj atipodoj de alternativa roko.

Notinda estas la kunlaboro de la kelkaj famaj artistoj kiel nemalhavebla **Ĵomart Amzejev**, **Eric Languillat** de **Inicialoj DC**, **Anders Grop**, la bastisto de **Persono** el la unua epoko, kaj multaj aliaj malkovrindaĵoj.

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd125&Ing=e>

Ángel Arquillos

Feliçan Jaron
2015

